



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 217

Majo 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

PRINTEMPA DEMANDO

Estimata Redaktora Moŝto,

En la printempo, kiam iom varmas la vetero, mi multe ĝuas veturigi mian etan aŭtomobilon tra la kamparaj stratetoj por flari la florojn kaj aŭskulti la birdokantojn. Tamen, ĉi-jare ĉe la nepavumitaj etvojoj estas eĉ pli da kavoj ol kutime, ofte plenplenaj de akvo, kaj kelkaj estas terure grandaj! Estas danĝero, ke mia eta aŭto enfalus, eĉ ke mi dronus.

Mi deziras vin demandi, de kie venas tiuj vojokavoj? Ĉu iu fosas ilin en la nokto? Ĉu ŝtelistoj venas por forŝoveli la gruzon kaj la koton? Ĉu ekzistas homoj tiom senhavaj, ke ili devas alproprigi al si la materialon el niaj kamparaj vojoj? Mi miras.

Mi esperas, ke vi povos helpi min kompreni la strangan aferon.

Sincere la via,

Kon Fu Zita

Estimata S-ro Zita,

Multan dankon pro via demando. Mi mem ne scias la respondon. Mi loĝas en urbo, kie oni bone scias pri tio, kial truoj aperas en la pavumitaj stratoj: dum printempaj noktoj la strat-truaj diabloj venas pli ofte ol kutime, kaj iom post iom ili formanĝas la stratojn. Tamen estas tiuj, kiuj ne konsentas pri tiu klarigo. Eble aliaj klarigoj pli taŭgas, kiel ekzemple:

- Temas pri kampanaj fratoj de la urbaj strat-truaj diabloj, kiuj preferas ataki kamparajn vojojn;
- Akvo de fandiĝantaj neĝoamasoj malfortigas la konsiston de la vojoj, kaj la surfacoj malstreĉiĝas laŭ diversaj rapidecoj;
- Kiel oni ofte diras en Kebekio, kulpas la federacio!

Evidente, ĉi tiuj klarigoj malmulte valoras. Ni invitas al ĉiuj legantoj partopreni en la klarigo, donante respondon al la demando. Kion vi opinias, kara leganto?

Via redaktoro

NOV-SKOTIA PARLAMENTANO ESPERANTLINGVA

La plej nova Esperantisto en Nova Skotio estas provinca parlamentano. Graham Steele interesiĝis pri la lingvo, kaj li rapide finis la poŝtan kurson, kiun Kim Keeble gvidas. Kvankam li ne havas multan kroman tempon ĝis nun por niaj kunvenoj, li certe estas bonvenita en nian rondon. Por legi esperantlingvan ĉefpaĝon pri tiu parlamentano, bonvolu viziti la retlokon de Graham Steele ĉe <http://www.grahamsteele.ca/esperanto.html> kaj kuraĝigu lin.

SURPRIZITE, KONVINKITE, KONSENTITE!

Pri la artikoloj „Reni Guglas” kaj „Blunazuloj” en la numero 216 de *Inter Ni*, nun mi volas skribi mian artikoleon.

Ho, Connie Clarke estas famekonata aktorino en la mondo! Mi tre longe konas ŝin, sed tute ne sciis. Ĉu vere? Unue mi dubis miajn okulojn. Due mi tute konsentas pri la sekvanta frazo “La nia estas mondfama kuiristino.” Mi volas aldoni jenajn frazojn „Ŝi ŝatas kolekti aĵojn rilate al porko, kaj jam multe da porkoj staras, sidas, glutiĝas kaj pendiĝas en la domo.”

Mi denove volas aldoni frazon pri Kim Keeble, „Ŝi estas Honora Membro de Kanada Esperanto-Asocio.” Cetere kun ŝi mi pli ol 20 jaroj daŭrigas korespondadon. En la komenco ŝi jam estis instruisto de la perpoŝta kurso ne nur por lokaj lernejoj sed ankaŭ por plenaĝuloj en Kanado, mi aŭdis. Ŝia kariero kiel instruisto de Esperanto estas bonega laŭ mia opinio. Mi estimas ŝin pro ŝia volontulemo por vastigi Esperanton al kiu ajn.

Laŭ mia memoro Gene Keyes estis tre milda kaj kvieta viro, kaj Mariĵo Graca estis tre flue parolema kaj vigla. Verŝajne ili estas tute konvena paro por labori aŭ movadi kune. Mi ne bone komprenas la anglan lingvon, do, se mi malfermos ilian retlokon, vere ne legeblas la programo bedaŭrinde.

Bob Williamson konata de mi estas tre simpatia viro. Kiam mi legas *Inter Ni*, mi sentas lian prizorgon al legantoj. De dekelkaj jaroj mi de tempo al tempo ricevis *Inter Ni*-n pere de Kim Keeble, de antaŭ kelkaj jaroj mi mem abonis sendante monon, ĉijare Kim bonkore abonis por mi. Dum la jaroj Bob foje pardonpetis al legantoj pro malfruaj eldonojn. En la kialo eble inkludiĝis, ke artikoloj ne atingis lin aŭ malfrue atingis. Ankaŭ mi bone scias tian akcidenton, ĉar en mia grupo okaze de eldoniĝo ne ĉiam kolektiĝas tutaj artikoloj kaj necese malfruiĝas eldoni. Redaktora laboro estas tute grava kaj lacega, supozeble. Koran dankon al li.

Artikoloj verkitaj de Steĉjo Norvell ĉiam konfuzis min pro enhavo, gramatiko, propraj vortoj, ktp. Ankaŭ lia aspekto estas grandioza por mi. Leginte lian karieron, mi komprenas lin. Kiam mi vizitis lin kun Kim por partopreni la lokan Esperanto-klubon antaŭ 9 jaroj, li akceptis kaj regalis min. Estis mia kara memoraĵo.

Mi unuafoje sciis, ke Reni estas karesnomo. Laŭ mia memoro ankaŭ li same kiel Gene estas milda kaj kvieta. Kiel li estas famekonata diversmaniere, mi tute ne sciis. Nur simple ke li estas presisto, enpoŝtigisto kaj kontisto por *Inter Ni*. Ankaŭ li estas ulo de abunda talento.

Laŭ la interrilato kun Kim Keeble mi povis koni ulojn, kiuj havas unikan, plenplenan, diversan povon krom pri Esperanto. Mi estas feliĉulo, ĉu ne?

— NISHI Chizuko

PRI LA TITOLO „BLUNAZULOJ”

Jam dufoje mi povis viziti la lokon Nova Skotio. En tiuj vizitoj mi volis etendi miajn krurojn en Kabo Bretono-n, tute bedaŭre ne permesis tion al mi manko de tempo. Rigardinte fotojn, mi sopiris al la loko, iomete mistera. Iam, se mi povos, mi „malsupren” iros tien.

Estis tre interesa la rakonto ke iam tiel nomataj „blunazuloj” vivis inter maristoj kaj fiŝistoj en Nova Skotio. Ĝis antaŭ kelkdekaj jaroj en Japanio, knaboj kaj knabetoj forviŝis nazmukon per manumoj de sia vesto en vintro. Pro tio kvankam sur ilia nazo ne aperis makulo, sed sur manumoj. Manumo brilis pro nazmuko alfrotiĝinta plurfoje. Tamen knabinoj portis kaj uzis paperon. Kompreneble nun dum jaroj geknaboj portas molan paperon porteblan, neniu forviŝas nazmukon per manumoj.

Kaj tiun malnovan okazaĵon iuj ne rememoras kaj iuj tute ne scias.

— NISHI Chizuko (Kioto, Japanio)

RUANDON MEMORAS LA MONDO

Pasintmonate, la 7-an de aprilo oni solenis la dekan datrevenon de la komenciĝo de terura, cent-taga, intergenta buĉado en Ruando. Fakte, dum aprilo oni memoris la kvar plej severajn genocidojn de la 20-a jarcento: tiujn en Armenio (1915-1916, 1 miliono), en la eŭropa holokaŭsto (1939-1945, preskaŭ 10 milionoj, 6 milionoj el tiuj judoj), en Kamboĝo (1975-1979, 2 milionoj), kaj en Ruando (1994, 800,000). La fakto ke oni kredas ĉi tiun genocidon tute preventebla nur pliigas la hororon de la evento, kiu daŭris dum aprilo, majo, junio, kaj la plejparto de julio 1994. La terminon genocido elpensis en 1944 Raphael Lemkin, internacia advokato kaj pola judo. Li kunigis la grekan vorton *genos* (popolo, gento) kun la latina sufikso *-cide* (mortigo) por esprimi koncepton de grandega krimo kontraŭ la homaro. Kiel homoj kiuj multe valoras la malon, ni Esperantistoj devas daŭre gardi nin kontraŭ tia krimo. Evidentiĝas, ke ĝi povus okazi denove.

— Bob Williamson

PARDONPETO

Saluton al ĉiuj anoj de nia Esperantista rondo,

Mi deziras peti pardonon de ĉiuj kiuj, pro eraro en la nova PIV, misuzis la vorton *anizosfigmio* en la pasinta jaro aŭ du. Revizianta la PIV-vortaron, mi ne rimarkis la malbonan difinon en malnova PIV kaj pro tio ne korektis. Mi sincere esperas, ke vi ne tro ofte uzis la vorton *anizosfigmio* laŭ la neĝusta difino.

Kulpe vin salutas Steĉjo

La redaktoro aldonas: Jen la plibonigita difino de “anizosfigmi/o” trovita en la reta dokumento ĉe:

<<http://satesperanto.free.fr/aktuale/NPIV-Korektendoj.pdf>>:

“Neegaleco de la pulsoj en simetriaĵaj arterioj, ekz. en la du radiusaj arterioj.”

